

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 9 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1977

N° 62



nimes

vokas vin !

Nimes kaj la lokaj gesamideanoj invitas nian ĉi jaran federacian kongreson la 7-an kaj 8-an de majo.

Sabato 7-a de majo:

15 h. Malfermo - Laborkundido ĝis la 19-a.

21 h. - distra vespero. Prezento de filmoj far F-ino TERRAL:

1° - "La rondiranta Stelo" - Universala Kongreso en Vieno (1970) kaj post-kongresa vojaĝo - 30 minutoj.

2° - "Preskaŭ Norda Kabo" - Kongreso en Kuopio (1972) kaj vojaĝo en Finnlando preskaŭ ĝis Norda Kabo - 30 minutoj.

3° - "Rekte al Grezijono" - vivo en la kastelo kaj ekskursoj: Nantes, Langais, Villandry, Azay le Rideau - 15 minutoj.

Post la dua filmo 15 minuta paŭzo. Finos la distra vespero skeĉo "Incendio" de Bukar, ludita de S-ino AUTHIER kaj F-ino TERRAL - 20 minutoj.

Dimanĉo 8-a de majo:

9,30 h. - Laborkunsido - Fino de la diskuto.

12,30 h. - Komuna tagmanĝo ĉe "La Brasserie Moderne".

15,00 h. - Laŭdezire, vizito de la urbo kaj de la romiaj monumentoj.

Praktikaj informoj:

Dormoĉambroj - Eblas antaŭmendi dormoĉambrojn en tri hoteloj. La prezoj varias de 30,00 frs. (1 dupersona lito, duŝo) ĝis 47,50 frs. (1 du persona lito, duŝo, necesejo).

Estas ankaŭ kelkaj dormoĉambroj kies ponokta prezo estas de 28,50 frs. (1-unupersona lito) ĝis 35,00 frs. (2 unupersonaj litoj) kun duŝo kaj necesejo ĉe la etaĝo.

Tiuj ĉi prezoj ne inkluzivas la matenmanĝon.

Kiu ajn estas via elekto nepre necesas, jam de nun, rezervigi la dormoĉambrojn. Sin turni al S-ino VOLPELIERE, 8, rue Rouget de Lisle - 30000 - Nimes, samtempe antaŭpagante 20,00 frs. (C.C.P. Montpellier 692 10).

Restoracioj - Pluraj troveblas en la kvartalo. La prezo estas inter 18,00 frs. kaj 35,00 frs.

Dimanĉa komuna tagmanĝo - Prezo: 20,00 frs., sen la kafo.

Kunvenejo - "Centro Pablo Neruda" (kultura kaj sporta centro) - Rue du Cirque Romain. Tiu ĉi strato kuŝas inter la rue de la République kaj boulevard Jean Jaurès.

Laborkunsidoj - La aktivaj membroj de U.F.E. voĉdonos pri kvar punktĝoj koncernantaj la landan filion de U.E.A. : agadraporto, financa raporto, buĝeto, renovigo de triono de la konsilio. Ĉiujnecesaj informoj kaj voĉdonilo troveblas en la n° 302 de "Franca Esperantisto" kaj la listo de la voĉdonontĝoj je la fino de tiu ĉi cirkulero.

La cetero de la kongreso estas ĉies afero. Pri sugestoj kaj aferoj kiujn vi dezirus pridiskuti, ĉu nur en Nîmes ĉu ankaŭ en Grenoble, vi skribu al mi por ke mi ilin envicigu en la tagordon.

Estus bone, ke al la nacia kongreso ni direktu ian tekston. Ĉu vi havas opinion pri la temo? Ankaŭ pri tio vi skribu al mi.

La ĉeesto de ĉiuj estraranoj kaj komitatanoj estas kompreneble necesa sed ju pli multnombraj ni estos entute, des pli bone kaj kuragiĝe.

Nîmes, la franca Romo, kaj la lokaj gesamideanoj entuziasme invitas nin. nia ĉeesto estos por ili la plej delikata dankesprimio.

LISTO DE LA AKTIVAJ MEMBROJ DE U.F.E. en 1976
(ricevas "Franca Esperantisto")

ALES (4) : Ges-roj BOLLA, NOGUIER, POLGE, RAYNAUD.

BEZIERS (3) : S-ingĝj AUTHIER, ROUVEURE, TERRAL.

MONTPELLIER (11) : Ges-roj BETTAN, BONNEFOUS, BONY, CAPUS André, CAPUS Suzanne, DIEZ, LAURENTI, LENNHARDT, MOURGUES, NEGRON, VIERNE.

NARBONNE (3) : S-roj COQUIN, DELIGNE, GRANIER.

NIMES (14) : Ges-roj AVESQUE, CABANE, CACHON, COMBES, JANEZ, METGE, MOUNIER, ROLLE ROSE, SALAN, SCHLUMPF, VASSAS, VOLPELIERE Renée, VOLPELIERE Roger.

PERPIGNAN : Esperantista Kulturcentro (2) : F-ino LLECH-Walter Colette, S-ro LLECH-WALTER.

U.S.C.M. - ESPERANTO (2) : Ges-roj AMOUROUX, CHABRERIE.

Nur tiuj ĉi membroj voĉdonos pri la agado de U.F.E.

Kompreneble plej bone estas, ke ili kongresu en Nîmes sed, se neblas, ili tamen transdonu al sia grupvidanto aŭ al kongresonto:

- ĉu rajtigilon,
- ĉu jam pretan voĉdonilon.

Neniu estu indiferenta pri la vivo de nia landa asocio. Pro tio necesas voĉdoni.

NEKROLOGO
=====

La montpeliera grupo funebras:

En decembre kaj januaro ni havis tri gravajn perdojn:
tri samideanoj forpasis: Sinjoroj GUERRE, LAURENTI kaj SABOURIN.

Ni sincere kondolencas la familianojn

FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO



Baugé, la 21-an de decembro 1976,

Laŭreatoj de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono" ĉe la ekzamenoj por 1976.

I - Atesto pri lernado:

SABOURIN Pierre (TB), MOUNIER Clarisse (TB), COULOMB Claudine (TB), SABOURIN Marie (B), AZAIS Patrick (B), NOGUER Empar (B), SUBIROS Nicole (B), TESTAS Raymond (B), PLANES Fernande (B).

NOGUER Albert (SB), NOGUER Georges (SB), ROCA Elisabeth (SB), DESCAUSES Lucette (SB), DIEZ Simonê (SB), LANTHIEZ Josiane (SB), LE GARREC Georges (SB), PASCALLET Robert (SB), PERIER Marcel (SB).

BAUZON Michel, PLANCHENOT Jean-Luc.

2 - Atesto pri praktika lernado:

COQUIN Roger (TB), SABOURIN Pierre (B), SABOURIN Marie.

3 - Atesto pri kapableco:

CAPUS Suzanne (TB), BONY Jeanninê (B), DELIGNE Maurice (B), CAPUS André (SB).

Changement dans le déroulement des épreuves pour le

CERTIFICAT DE CAPACITE

Dorénavant, l'épreuve écrite aura lieu dans le courant de l'année scolaire, sous la surveillance d'une seule personne détentrice du Brevet de Pédagogie et agréée par le Directeur des Examens. L'écrit sera ensuite envoyé à ce dernier.

Les épreuves orales n'auront lieu que pour les candidats ayant satisfait à l'écrit et, lorsqu'il sera possible, par exemple lors de congrès, ou à Grésillon, de réunir trois détenteurs du Brevet de Pédagogie, et dans les conditions habituelles.

Il ne devra pas s'écouler plus de 2 ans entre l'écrit et l'oral.

Toute correspondance relative aux examens doit être adressée à la Directrice des Examens: Madame J. VINCENT, B.P. 92, - 27700 - Les Andelys. CCP Rouen 574 88R.

4 Kurs - prelegoj dum unu semajno !

LLECH-WALTER, delegito de U.E.A. en Perpignan, Prezidinto de U.F.E., Prezidanto de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono", faris, mardon 22.2, du kurs-prelegojnantaŭ 80 gelnantoj de la Kolegio "Albert Camus en Perpignan.

La departementa asocio de la "Eŭropa Movado", prezidanto Leprince-Ringuet, invitis LLech-Walter, por prelegi pri "Esperanto, lingvo de Eŭropo" antaŭ la membroj ne-esperantistoj de tiu movado. La grava fakto estas, ke grava asocio ne esperantista petis preleganton por paroli pri Esperanto. Tiu prelego okazis do en la "Domo de Eŭropo" en Nice, vendredon la 25an de februaro.

Sabaton 26.2 kvara prelego kaj kurso en Cannes ĉe kultura Centro de la Urbo. Ĉeestis multaj ne-esperantistoj sed ankaŭ la deputito-urbestro kaj urba-konsilio.

A.V.

nimes

Vizito de alilandano estas ĉiam samtempe utila kaj agrabla por niaj grupoj. Tia estis tiu de Mikiko Mimori, kiu vizitis Nimon de la 11a ĝis la 17a de januaro.

Ni admiru la kuraĝon, ni diru la aŭdacon de tiu junulino, kiu foriris al Eŭropo ankoraŭ ne lerta esperantistino kaj vizitis grupojn en kelkaj landoj de Sudorienta, norda kaj okcidenta Eŭropo, progresante en nia lingvo dank'al senĉesaj kontaktoj kun niaj samlingvanoj.

La ridetanta fraŭlino estis gastino de GeMasson, paro de instruistoj, kiuj partoprenis la nun tre konatan "RIDEE" en Polujo kaj estas tute novbakitaj esperantistoj. S-ro Masson komencis gvidi kurseton en sia kolegio, lernante samtempe kun la knaboj kaj ni plezure konatiĝis kun li kaj lia edzino, ĉar ili tute ne havas tempon por ĉeesti nian ĉiumonatan kunvenon.

Mikiko vizitis tiun kolegion: le dum iu kurseto, 2e por ĉeesti francajn kursojn kaj ekkoni la edukmanieron en Francio. Ŝi vizitis ankaŭ la CES Mont Duplan, en kiu S-ro SCHLUMPF instruas. En la du kolegioj troviĝis direktoroj kaj instruistoj kiuj tre afable akceptis ŝin kaj favoras al Esperanto. En du lernejoj: en Nimo kaj en la vilaĝeto St-Dionizy, Mikiko montris siajn "orogami", paperfaldaĵojn, kelkajn simplajn, kelkajn pli komplikajn, kiuj kaptis la atenton de la infanoj kaj tre plaĉis al ili. Tio tre plezurigis la du instruistinojn, S-inojn Mounier kaj Avesque.

Nura nigra punkto, la inspektorino de S-ino Frus kaj de F-ino Coulomb ne konsentis la viziton de "fremdulino" en iliaj lernejoj.

Ĉiuj grupanoj invitis nian amikinson al unu aŭdu manĝoj kaj kelkaj vizitigis al ŝi niajn vidindaĵojn. En tiu cirkonstanco la "Rondo" montris tre ŝatindan solidarecon kaj Mikiko skribis kiel plaĉa estis ŝia restado en Nimo.

Ĉi tiu finiĝis per tre agrabla komuna manĝo en restoracio al kiu partoprenis kelkaj grupanoj.

KURSOJ La du kursoj: la kaj 2a gradoj (ses kaj tri gelernantoj) kontentige funkcias malgraŭ la diverseco de la aĝoj: de 17 ĝis 75 jaroj (!) en la unuagrada kurso.

FEDERATION DEPARTEMENTALE ESPERANTO DE L' HERAULT


La kotizoj por 1977 estas 7 frs.. Kiel kutime ĝi entenas la abonon al nia regiona bulteno "Sudfrancia-Stelo". Do se vi pagas la kotizon al la Federacio Herault, vi ne bezonas pagi la abonon al "Sudfrancia-Stelo".

Dua avantĝo de la aliĝo al la Federacio Herault: vi estos informitaj pri renkontoj kaj akceptoj de eksterlandanoj en la regiono. Ju pli multaj ni estos

K R U C V O R T O J

Horizontale *

- 1- La maskigtago, kiun ŝiuj festas.
- 8- Duonaristokrato
- 9- Karel konfuzigas, por esti pli bone informita.
- 12- sinsekvaj vokaloj.
- 13- Ŝanco' je malbon ŝanco.
- 14- Tizand' flonet'.
- 16- La mortata flago.
- 19- Amego en la budo.
- 20- Orient' laŭ iuj.
- 21- Malrapid' laŭ iuj.
- 23- La koro de la panjoj.
- 24- Laŭdinde kuraĝa
- 25- Fraa turnigo kaj komenco de nenio, por eniri la kukon (2).
- 28- La praktika esprimi' de bedaŭro pri siaj faroj.



Geoffrey KING (1977)

Vertikale *

- 1- Edz(in) trompad-
- 2- Forprenant de herbaĵoj.
- 3- Ĝis la alia flanko de.
- 4- Vi kaj mi.
- 5- Unu malpli ol la du.
- 6- Silento en la mezo de la festoj.
- 7- O, vilo! revenu por la frukto.
- 10- Tolstoj finiĝas kun unu enmeze, kaj ekestas la tabuloj.
- 11- Ekzistas.
- 12- Publikigo.
- 14- La kantistino Dietrich.
- 15- Ardi en ldo.
- 17- Indi minus du.
- 18- Prepozicio
- 19- Buŝvarmiga sem' — 22- Rezult' de 21 — 24- Ĉevala pied'.
- 25- La koro de Dafnis — 26- Participe finaj' — 27- La dudekuna litero.


* - La solvo aperos en la venonta numero

L	A	M	A	R	V	I	R	I	N	E	T
A	D	E	K	V	A	T	A	■	E	R	O
L	O	G	A	■	K	A	B	L	O	■	P
I	R	A	D	O	■	L	A	■	F	I	A
B	I	L	E	T	O	■	S	T	I	L	Z
R	■	O	M	A	R	O	■	O	T	■	O
O	■	M	I	R	A	B	E	L	O	J	■
D	I	A	■	I	K	O	N	O	■	O	V
E	T	N	O	■	O	L	D	■	E	G	E
Z	■	I	D	O	L	O	■	E	B	U	R
E	K	■	E	R	O	J	■	M	A	R	T
N	O	R	T	O	J	■	M	A	R	T	A


Rowe Raymond (1976)

Solvo
 de la krucvortoj
 aperintaj en la N^o 61


5 minutoj de paŭzo




SEN VORTOJ



Nun, absolute mi ne volas aliloki mian galerion!



Estas simple pro tio, ke mi forlasas konstante la lasta mian oficejon.



SEN VORTOJ



SEN VORTOJ



Vere tio ne estas valorega libro kiel oni diras!

ANNUA ITOU A L'OFFICE TOURNAI EN ARLES - ARLES - 17 AVRIL 1977.
Bureau de la Fédération Française des Centres Culturels d'Espéranto
1977, 1978 en commun A l'Hôtel de la Poste, puis autres réunions.

des pli la subvencio donata de Conseil Général de l'Hérault farigos grava.
Tiu alvoko valoras ĉefe por la izoluloj, ĉar la grupanoj de Béziers kaj Montpellier, kiam ili pagas sian kluban kotizon, pagas aŭtomate la kotizon al la departementa federacio Hérault.
Jen la indiko de la CCP por la izoluloj: Fédération Départementale Espéranto de l'Hérault - CCP n° 1689-89 - Montpellier.

M O N T P E L L I E R

Groupe Esperantiste de Montpellier - 5, rue Docteur ROUX -
CCP - 1487-48 - Montpellier.

Kunvenoj - 15, rue du Faubourg Figuerolle.

La 8an de novembro, 25 klubanoj partoprenis la kunvenon. Estis festa/ago: okazis la transdono de la diplomoj:
10 atestoj pri lernado,
1 atesto pri praktika lernado,
3 atestoj pri kapableco.

Ĉar estis festo, ni manĝis kukojn kaj trinkis, Ni vojaĝis tra Greklando dank'al diapozitivoj.

La postaj kunvenoj estis aparte allogaj.
- lundon la 10an de januaro, japanino gvidis la kunvenon. Ŝi estas en Eŭropo de pluraj monatoj kaj restos en nia regiono dum kelkaj semajnoj.

Ĉiam estas interese kaj agrabla paroli kun esperantisto de fora lando kies civilizo estas tutalia ol nia.

- lundon la 7an de februaro, jam tradicia: la rega festo.

D-ino V I E R N E.

En januaro la grupo invitis junan japaninon Mikiko MIMORI.
De Montpellier ŝi vizitis la regionon kaj aliajn grupojn kiuj ŝin invitis.
Ŝi estas estonta instruistino kaj pedagogio estas ŝia fakto. En Montpellier ŝi vizitis 3 unuaj-gradajn lernejojn kie ŝi parolis pri Japanio kaj prezentis paperfaldadon. Poste la infanojdemandis.

Sama programo okazis ĉe la 3 kursoj de Esperanto kaj ĉe la fakultato "por la tris aĝo". Tiel montpelieranoj junaj kaj malplijunaj vidis, ke esperanto ekzistas.

Ĉe la loka klubo ŝi prezentis diapozitivojn montrantajn la uzon kaj fabrikadon de papero en sia lando. Tre interesa kaj nekutima industrio.

Dum majo, ni invitos 2 junajn hungarinojn. Ili alvenos meze de majo kaj restos 15 tagojn en la regiono. Ili planas ĉeesti la landan Kongreson en Grenoble.

La grupoj aŭ izoluloj kiuj deziras inviti ilin, aŭ unu el ili sin turnu al la klubo de Montpellier.

Ili prezentos Hungarion (historio kaj popolkantoj). Ĉiam estas interese kaj agrable paroli kun esperantisto de alia lando kun malsame civilizo.

GRAVA SANGO - Ĉar lundo ne taŭgas por ĉiuj, ni kunvenos ekde aprilo la unuan MARDON de la monato. Tiel la venontaj kunvenoj okazos:

mardon la 5an de aprilo,

mardon la 3an de majo.

Le 43me Congrès de la Fédération Provençale des Centres Culturels d'E.

Aura lieu à l'Office Tourisme en Arles-sur-Rhône le 16 et 17 Avril 1977.

Samedi 16 - 15,30h Visite guidée de la Ville, ou session d'examens.
- à 19h. Repas en commun à l'Hôtel de la Poste, puis soirée récréative,

Dimanche 17 - 9,30h Assemblée Générale - 12,30h Réception à la Mairie
- 13,30h Repas à la Bienheureuse (35F) + récréation et concours de boules

Renseignements en Arles - Mme Marie BLARY - 8 rue Formigè ☎ (90) 96 16 70

Ekde la 28a de februaro, en Grenoble, meĥanika poŝtstampo jene diskonigas la landan Esperanto-kongreson: "ESPERANTO / CONGRES / GRENOBLE : 27-31 mai 1977.

Por ricevi la kondernan poŝtstampaĵon sufiĉas sendi al la: "Chef du Centre de Tri P.T.T. - 38000 - Grenoble" tiom, kiom da dezirataj kovertoj aŭ kartoj, jam afrankitaj kaj adresitaj kun peto, ke ilin enpoŝtigu, post stampigo pere de la Esperanto-poŝtstampo.

J.A.

Kiu povas helpi ?

Kiu povas helpi min kompletigi la kolekton de la diversestitolaj ligiloj de nia federacio: "Entre-Nous" (1934-1935), "La Verda Stelo" (1936-1938), internaj cirkuleroj dummilite, "Verda Steleto" - presita - (1946-1948), "Sudfranca Stelo" (ekde 1961).

Repago laŭdezire. Anticipan dankon.

Skribi al Jean AMOUROUX - 1, rue de Sorède - 66000 - Perpignan.



NI PERFEKTIGU - Pri particip-adverbo

En la lasta numero de S.F.S. ni aludis pri "absoluta participo". Tio, kion ni skribis valoras ankaŭ kiam temas pri "particip-adverbo (gerundio).

Ex: La Fortune lui vint en dormant

Le coeur lui bat en appuyant sur la touche (Romain Rolland: Jean Christophe).

"en dormant", "en appuyant sur la touche" estas "absolutaj" (ne havas rilaton kun la cetero de la frazo).

Tiaj frazoj NE estas tradukeblaj se oni ne modifas ilin.

"La Fortune vint à lui pendant qu'il dormait" = aŭ "pendant son sommeil."

"En appuyant sur la touche, il sentait son coeur battre".

"Frapante sur la klavo, li sentis sian koron bati". La subjekto de "frapante" devas esti la sama kiel tiu de "sentis" (= LI frapas kaj LI sentas).

Konsekvence, oni ne diru: mi sendas al vi ĉe-metite leteron pri. Tio signifus: "ĉe-metite, mi...". Do, "mi" estas en la koverto. Ni diru: mi sendas al vi ĉe-metite ...; aŭ: ĉi-ene. (Vidu LINGVAJ RESPONDOJ n° 118).

(Rimarko: eĉ en la moderna franca lingvo, oni ne plu uzas tiajn formojn, krom en esprimoj, kiel "l'appetit vient en mangeant".

L. LENTAIGNE.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal: 1^{er} Trimestre 1977

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes